

# Protokolo de la estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo

ĵaŭdon la 29-an de aprilo 2021 per Zoom

(aprobata en la la reta estrara listo la 30-an de aprilo 2021, ĉar la lasta kunsido antaŭ la landa kongreso)

## Ĉeestis

Mario Machlik kaj Claude Rouget (de meze en punkto 3), Tromsø

Jardar Eggesbø Abrahamsen kaj Herman Raner, Trondheim

Bård Hekland, Bergen

Lars Sandbakk, Stavanger

Amelie Matt anoncis nepartoprenon. Claude Rouget daŭre havas retroŝtajn problemojn, kaj ni forĝesis sendi inviton al lia alternativa adreso.

## 0. Tagordo

La tagordo estis dissendita la 23-an de aprilo. La tagordo aprobiĝis.

## 1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 18-an de marto

La malneta protokolo estis dissendita la 19-an de marto. La protokolo aprobiĝis kun etaj korektoj.

## 2. Pritakso de la nordia retkunveno (17.04.21)

El la estraranoj ĉeestis Mario, Herman kaj Bård. Prezentis aldone al Charlotte Scherping Larsson ankaŭ i.a. TEJO-estrarano pri landa agado Albert Stalin Garrido. La enhavon ni taksis malsame, de «interese» al «teda». La prezentantoj bone prepariĝis, sed ne ekestis tre vigla diskuto. Grava zorgo estas, ke neniu en TEJO-aĝo aliĝis por diskuti ĉi tiun temon. Ni ne scias, ĉu kulpas la temo, la elektita tempo (sabaton posttagmeze) aŭ ĝenerala laciĝo pri retaj kunvenoj. Krom la prezentantoj, estis ĉeestantoj de Norvegujo, Svedujo kaj Danujo.

Ni diskutis ĉu kaj eventuale kiel daŭrigi pri tiaj aranĝoj. **Decido:** Ni daŭre faru tiajn retajn eventojn almenaŭ dufoje jare. Ni testu, ĉu pli multaj aliĝos por aranĝo en labortaga vespero (precipe tiel povas esti en la «luma jarsezono»). Ni ankaŭ instigu al la membroj partopreni en internaciaj retaj aranĝoj (i.a. la okazonta Virtuala Kongreso).

## 3. Landa kongreso 2021

Estas dissenditaj la formale necesaj informoj per NE-isto 2/2021.

### Strukturo

**Decidoj:** Ni restos je la plano komenci je 14:00 kaj sabate kaj dimanĉe. Sabate ni traktos la jarraportojn, kalkulojn kaj proponojn. Dimanĉe ni komencos per prelego kaj kundiskuto kun la UEA-

prezidanto (maksimume 50 minutoj), poste diskutos agadplanon kaj ĝenerale pri okazonta agado, elektoj kaj venonta kongreso. Ni provos esti efikaj, tiel ke ambaŭ kunsidoj ne daŭru multe pli ol du horojn, se eble.

#### Ricevita propono: De Ingebjørg Rambjør pri redukto de la estraro

Ni diskutis du aferojn: 1) Ĉu eblas fari tian decidon (ĉar temas pri statutŝanĝoj, kiu laŭ la statuto estu prezentata al la estraro antaŭ la 1-a de marto) kaj 2) Ĉu la estraro eventuale apogas tian ŝanĝon?

**Decido:** La statuta datlimo pri 1-a de marto celas, ke la estraro havu tempon pritrakti la proponojn antaŭ la publikigo unu monaton antaŭ la kunsido. Se venus prete formulita ŝanĝpropono (la propono postulus ŝanĝon en kaj §13 a kaj b), la estraro pretus trakti ĝin. Tio ne haveblas. La estraro anstataŭe proponas diskuti la aferon en la landa kunveno kaj prokrasti la formalan decidon. Se ne estos sufiĉe da kandidatoj por la nunaj 5+2 membroj, ni devos nun elekti nekompletan estraron kaj praktike solvi la demandon pri kvorumeco.

Leviĝis diversaj argumentoj por kaj kontraŭ redukto de la nombro de estraranoj, sed sen klara konkludo.

Ne venis aliaj proponoj de la membroj.

#### Propono pri ĉiujaraj kongresoj

Mario proponis, ke ni konsideru fari ĉiujarajn Norvegajn kongresojn, alterne virtualajn kaj fizikajn. Montriĝis, ke laŭ la statuto, ĉiujaraj kongresoj fakte estas la baza opcio, do ne necesas statutŝanĝo.

**Decido:** Ni diskutos tion en la landa kunsido ĉe la koncerna punkto.

#### Repago al la kluboj kaj al NJE

Laŭ la statuto, paragrafoj 8 kaj 10, la landa kunsido decidu, kiom da mono estu plupagata al la kluboj kaj al NJE. La lastajn jarojn ni transigis 2500 kronojn jare al NJE. Ne estis preta propono pri sumoj/procentaĵo de kotizoj. **Decido:** Claude esploros ĉe Douglas kiel estas kalkulata nun la pago al la kluboj kaj proponos sumojn al la estraro ene de la 3-a de majo. Se eble, ni dissendos proponon de la estraro kune kun aliaj informoj per nel-diskut la 5-an aŭ 6-an de majo.

#### Prelego de Duncan Charters

**Decido:** Ni petos al la UEA-prezidanto komenci nian dimanĉan sesion je 14:00 per prelego kaj posta diskuto. Bård restos en kontakto kun li.

#### Vespera programo

##### Decidoj:

- Ni verŝajne okazigos ankaŭ ĝin per Zoom
- Prefere estu multaj mallongaj kontribuoj ol inverse
- Mario kontaktos Otton pri distra prezento
- Bård kontaktos Ingrid Berglund (Antonia Montaro) pri retaj esperantaj ludoj
- Lars respondecos pri kvizo, kiun ni respondos grupe
- Mario anoncos en nel-inform ke ni petas la membrojn kontribui al la distraĵoj

#### 4. Propono pri agadplano 2021-23

Bård estis dissendinta la ĝisnunan agadplanon kun kelkaj komentoj la 23-an de aprilo. **Decido:** Ni ĝenerale kontentas pri la plano, kvankam iuj partoj pli bone plenumiĝis ol aliaj, kaj proponos la saman por 2021-23 (kun etaj ĝisdatigoj).

## 5. Eventualaĵoj

Lars proponis, ke ni petu al NJE fari informfilmon por niaj retpaĝoj. **Decido:** Ni provos ĝenerale establi pli bonan komunikadon kun la NJE-estraro kaj diskutos i.a. tiun ĉi proponon. Sed la afero atendu ĝis post la landa kongreso.

Lars informis pri la entombigo de Alf Reidar Grødeland. Ĉeestis Lars, Berit Lande kaj Cecile Anda. Estis menciite, kiom valoris por Alf Reidar Esperanto en lia vivo.

Lars informis, ke la laborperiodo de Heroo en Stavanger baldaŭ finiĝos, sed ke Heroo serĉos alian laboron por povi pluresti nialande.

Lars informis, ke li registris «Esperanto Rogaland» ĉe Google tiel ke li tiel videblas kaj estas serĉebla en Google Maps. La klubo en Rogaland havis etan fizikan kunvenon antaŭ kelkaj tagoj.

Bård informis, ke la klubo en Bergeno planas renkontiĝi la 29-an de majo, kaj ke oni eble ankaŭ renkontiĝos por la vespera programo dum la landa kongreso.

Herman informis pri la diversaj problemoj kiuj okazis pri la komputilo en Esperantonia. Tre grave la membraregistro nun estas eligita de la speciala programo kiun uzis Anne Karin kaj transigita al normale redaktebla formato. Herman esperas vojaĝi al Oslo iam somere por povi fari agordojn kiujn malfacilas fari dedistance. Ankaŭ Claude vizitos Oslon meze de majo kaj tiam vizitos la oficejon kaj povos tiam prilabori komputilaĵojn.

La estraro decidis retroŝte en marto sendi florbukedon al la funebra ceremonio de Arne Olav Mjøen, inta estrarano de NEL kaj Uhlen, kaj iama prezidanto de la Eldonejo. La ceremonio okazis la 8an de aprilo sub pandemiaj limigoj. Por la Esperanto-movado ĉeestis Jardar Eggesbø Abrahamsen kaj Torstein Kvakland.

La interkonsiliĝo daŭris de 20:30 ĝis 22:30.

La venonta interkonsiliĝo okazos post la landa kongreso, la daton decidos la nova estraro.

Protokolis Bård Hekland